

Zaragoza, marto 2019



Numero 1 (tria epoko)

NIA VIVO

Revuo de la esperanta societo «Frateco»

Intervjuo al Antonia Lapuerta

Miaj unuaj jaroj lernante esperanton

Kiu estis doktoro Olavide

«La Malena», romia vilao

Einstein en Zaragoza

La sidejo de Frateco

Monaĥejo de Veruela



FRATECO

Esperanto-Asocio en Aragono

Calle Cadena, 20-22, 1º-izda.
50001-Zaragoza, España

Enhavo

Intervjuo al Antonia Lapuerta.....	3
Miaj unuaj jaroj lernante esperanton.....	5
Kiu estis doktoro Olavide.....	7
«La Malena», romia vilao.....	8
Einstein en Zaragozo.....	9
La sidejo de Frateco.....	11
Monaĥejo de Veruela.....	12

Teamo

Prezidanto	Lorenzo Noguero
Ĉefredaktoro	Pablo Conesa
Novajoj	Sabino Pelegrín
Desegno	Fernando Arroba

Redaktoroj:

.....	Antonio Marco
.....	Santiago López
.....	Enrique Navarro
.....	Fernando Arroba
.....	Miguel Ángel Martín
.....	Ángel López

Kiel sendi artikolojn por la revuo?

- Sendu prefere originalajn tekstojn kaj bildojn.
- La tekstoj en Esperanto kaj en .odt aŭ «email» formato, prefere. (Bonvolu, uzu UTF-8 kodoj kun ĉapelitajn literojn)
- La bildoj estu bonkvalitaj je 180-300 dpi. Ni preferas bildojn en PNG formato.
- Por vektoraj bildoj ni preferas SVG aŭ EPS.
- Indiku ĉu via artikolo jam aperis aŭ estas proponata al alia revuo.
- Se via artikolo estas traduko, indiku kie ni povas trovi originalan fonton.
- Informoj kaj ligiloj pri la temo de via artikolo estos bonvenitaj.

fratecoesperanto@yahoo.es

Revuo Nia Vivo

Calle de la Cadena, n^o20, 1^o izda.
50001 - Zaragoza, España

La societa vivo de Frateco en parto de la dua duono de la pasinta jarcento

Kiam vi eklernis Esperanton?

Mi komencis lerni ĝin en 1962. Mia instruisto estis s-ro Martínez.

Kial, kiel kaj kie vi eklernis la internacian lingvon?

Ĉar mi kolektis poŝtmarkojn kaj mia bofrato estis esperantisto. Estis grava filateliekspozicio en Frateco de esperantaj poŝtmarkoj kaj li sciigis tion al mi. Mi volis vidi la kolekton kaj post tia sperto mi ekinteresiĝis pri Esperanto. Tio estis la unua fojo, kiam mi malkovris nian lingvon.

Mi tiam laboris, kaj mi ne povis ĉeesti en la lernokursoj de Frateco, sed mia bofrato, Francisco Fernández Castillo, instruis la lingvon en la n-ro 46 de la strato Pignatelli, kie estis konata restoracieto nomata «El Casinico». Tie, en la sama lernejo, kie matene kaj posttagmeze instruis sia kuzino, li instruis Esperanton malfrue vespere kaj nokte, kaj tien mi iris por eklerni la lingvon.

Kiam vi aliĝis al Frateco?

En 1962, post miaj unuaj klashoroj de Esperanto kun mia bofrato, li kuraĝigis min por iri en Fratecon kaj tie ellerni la lingvon, kaj dum miaj du unuaj kursoj, s-ro Martínez kaj s-ro Salete estis miaj instruistoj.

En mia unua kurso mi sidis apud Mara Pilar Sancho Rebullida, kiu estis filino de la elstara juristo kaj rektoro de la Zaragoza

Universitato, s-ro. Miguel Sancho Izquierdo. Ekde tiam mi amikiĝis multe kun Mara Pilar.

En 1963 mi jam partoprenis en la 24a Hispana Esperanto-Kongreso celebrita en Barcelono de la 25a ĝis la 28a de julio. Mi havas mian kongreskarton kun la numero 288, subskribita de la prezidanto kaj la sekretario de la loka organiza komitato.

Kie situis Frateco en tiu tempo?

Tiam la sidejo de Frateco estis en la n-ro 1 de la strato San Vicente de Pal.

Kiom da jaroj vi ĉeestis kursojn de Esperanto?

Mi ĉeestis la du unuajn jarojn kiel lernantino, sed poste mi partoprenis en multaj taskoj de nia societo. Vere mi ne povis regule ĉeesti iun ajn kurson pro laboraj kialoj. Multajn vendredojn mi lernis multe kun s-ro Martínez. Ankaŭ preskaŭ ĉiujn sabatojn mi iris en Fratecon, ĉar de lundo ĝis ĵaŭdo mi laboris, kiam Frateco estis malfermita, kaj nur multajn vendredojn kaj ĉiujn sabatojn mi povis partopreni en la socia vivo de Frateco. Krom mi ofte helpis en oficejaj taskoj al Inés Gastón, kiu estis sekretario de HEF dum multaj jaroj.

Kiom da tagoj oni malfermis Fratecon dum tiu epoko?

Ne ĉiujn jarojn okazis same, sed dum kelkaj jaroj Frateco estis malfermita de lundo ĝis sabato, poste nur po tri aŭ kvar tagoj semajne. Tiam preskaŭ ĉiujn sabatojn estis prelegoj en Esperanto kaj poste oni faris kelkajn demandojn al la prelegintoj.

Kiom da kursoj estis ĉiun jaron en tiu epoko?

Kelkajn jarojn estis du kursoj, unu lunde, merkrede kaj vendrede kaj alia marde, ĵaŭde kaj sabate, sed ne estis ĉiam tiel, ĉar tio dependis parte de la nombro de gelernantoj. Tiam estis multe da homoj kaj oni faris aktivadojn preskaŭ ĉiujn sabatojn.



Antonia kaj aliaj fratecanoj en la tombejo de «La Cartuja».

Kiom da homoj estis tiam en Frateco?

Multaj pli ol nun, sed estas neeble diri la kvanton. Kiam s-ro. Miguel Sancho Izquierdo estis prezidanto de Frateco aliĝis al nia societo multaj homoj. Li ankaŭ atingis malfermi multajn pordojn por nia societo kaj por nia lingvo.

Kiajn komunajn aktivaĵojn oni organizis?

Ĉefe dum printempo kaj aŭtuno oni faris piedajn ekskursojn for de la urbo, sed ilia ofteco malkreskiĝis, kiam pli kaj pli da gefratecanoj akiris proprajn aŭtomobilojn.

Ĉiujare oni preparis ekspozicion pri esperantaj libroj ĉirkaŭ la Zamenhofa tago, antaŭ ol Kristnasko. Mara Pilar Sancho kaj mi kunlaboris multe en tiuj eventoj. Herminia estis, kiu plej altiris la gekomencantojn kaj societanojn por ĉeesti kaj partopreni.

Ĉu la gefratecanoj kaj aliaj geesperantistoj faris normalajn rendezuojn ekster Frateco?

Nur kun la grupo de Pau estis jaraj renkontiĝoj: unu jaron en Hispanio kaj la alian en Francio. Tio okazis preskaŭ ĉiam dum vintro. En Hispanio tio okazis ne nur en Zaragozo, sed ankaŭ en Jaca, en Hecho. En Francio oni renkontiĝis en Pau kaj en aliaj belaj lokoj. Kiam la tempo pasis kaj la gefratecanoj iom maljuniĝis ne plu okazis tiuj interesaj hispan-francaj renkontiĝoj.

Ankaŭ oni faris, dum kelkaj jaroj, piedajn ekskursojn al tombejo de La Cartuja por viziti, purigi kaj eĉ foje pentri krucon de malsana aŭstria infanino, kiu fine mortis en Zaragozo. Tiu infanino loĝis en la hejmo de Inés kaj Emilia Gastón kiel vera familiano kaj ne kiel karega gastino. La patrino veturis el Aŭstrio ĝis Zaragozo por adiaŭi la grave malsanan infaninon antaŭ ol ŝia forpaso. La adiaŭo estis ege emociplena. Mi multe vidis ploregi al fratinoj Gastón pri la forpaso de tiu infanino, kiun ili amis kiel

veran filinon. Emilio Gastón Ugarte, (patro de Inés kaj Emilia Gastón) estis, kiu elstare partoprenis en la gastigado en Hispanion de granda nombro de aŭstriaĝ geinfanoj de la Stiria regiono post la Unua Mondmilito.

Ĉu kreigiĝis paroj en Frateco?

Pilar kaj Miguel estis unu el la geedzaj paroj, kiuj konatiĝis en Frateco, ankaŭ geedziĝis Esperanza kaj José Luis Ordás, kaj ankaŭ estis alia paro pia.

Ĉu oni parolis kutime en Esperanto en Frateco?

Neniam oni parolis en Esperanto. Nur parte dum la kursoj, kaj la sabatojn, kiam okazis la legataj prelegoj. Ofte poste estis homoj, kiuj faris demandojn pri la temo en nia lingvo kaj la prelegintojn respondis same en Esperanto.

Ĉu vi memoras pri interesaj fratecanoj?

Unue Inés Gastón multege agis por Esperanto en nia urbo kaj en Hispanio. Ŝi estis senlaca esperantistino, dum multaj jaroj sekretariino de HEF. Ŝi engaĝiĝis en multaj projektoj pri nia lingvo enlande kaj eksterlande, kaj mi multe helpis ŝin en ŝiaj administraj taskoj.

Antonio Valn donis treege interesajn kursojn en Frateco.

Fernando de Diego parolis kaj instruis tre bone la lingvon, sed ekster la kursoj, ĉiutempe li parolis hispane.

Antonio Marco, granda esperantisto kaj tre laborema.

Jaime Benito, tre sin-oferema homo. Li multe helpis mone al nia societo.

Víctor Ortiz ĉiam mone helpadis al Frateco, laŭ siaj ebloj, kiam nia societo trapasis ekonomiajn malfacilaĵojn.

S-ro. Miguel Sancho Izquierdo estis kiu plej altiris homojn kaj plej malfermis pordojn al nia movado.

Eble mi forgesas iun elstaran esperantiston, sed ĉiuj kunlaboris, laŭ siaj ebloj kaj libera tempo kaj ĉiu estis bonkoraj homoj.

En tiu epoko kioma proporcio ekzistis inter viroj kaj virinoj?

Ĉiam estis multe pli da viroj ol da virinoj, sed certe tiam estis multe pli da virinoj ol nun, ĉar ankaŭ estis entute multe pli da homoj.

Kion alportis Esperanton al via vivo?

Esperanto alportis multe al mi: mi vojaĝis multe, mi lernis, ke ĉiuj homoj, malgraŭ niaj malsimilaĵoj, estas tre similaj. Por mi nur ekzistas homoj kaj ĉiam, nune kaj antaŭe, mi trovis bonegajn homojn inter la monda geesperantistaro.

«Mi komencis lerni
esperanton je 1962»



En la tempo, kiam mi estis ankoraŭ 17-jara, dum la somero de 1966, mi komencis scii iom pri Esperanto danke al revuo el "CCC-Klubo", kiun mia patro ricevis hejme. Temis pri konata Koresponda Kultur-Centro el San Sebastián. En tiu revuo aperis kutime tre mallongaj tekstoj en Esperanto, kiuj altiris mian atenton. Vane mi intencis mem lerni iomete la lingvon nur helpe de ĝia libera hispana traduko aldonita en la revuo.

Mi ne bone memoras kiel, sed mi eksciis la adreson de virino, kiu bone scipovis la lingvon, kiam mi jam estis 18-jara, kaj dum la somero de 1967 mi kuraĝis iri en ŝian hejmon por scii iom pli pri Esperanto, kaj se eble aĉeti libreton por memlerni ĝin. Ili estis la fratinoj Inés kaj Emilia Gastón, kiuj ŝajne estas la unuaj denaskaj esperantistinoj en la tuta mondo. Inés estis tre afabla kaj donacis al mi tre etan libreton, kiun mi ankoraŭ havas, eldonita laŭ ŝi dum la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, kvankam ĝi ne havas daton pri ĝia eldono.

Mi iris en ŝian hejmon de tempo al tempo, ĉar ŝi loĝis en avenuo Marina Moreno, kiu nun estas la bulvarado nomata "Konstitucio", ne tro malproksime de la hejmo de miaj gepatroj. Ŝi donacis al mi kelkajn aliajn revuetojn, kaj konsilis al mi komenci lerni la lingvon en Frateco, kie tiam estis en la unua etaĝo de domo en la strato San Vicente de Paŭl, n-ro 1.

Kiam mi iris tien je la unua fojo, la doma pordisto demandis al mi, kien mi iras. Post la klarigo li permesis al mi eniri en la domon kaj iri al Frateco. Kiam mi eniris, mi vidis, ke ĉiuj estas pli aĝaj ol mi, sed ĉiuj tre afablaj, ĉefe Herminia. Mi rakontis tie iom pri mi (tiam mi komencis studi ĥemiajn sciencojn ĉe la Zaragoza universitato), kaj mi aliĝis al kurso, kies instruisto estis s-ro Aldana. Ĝi okazis almenaŭ dufojesemajne (se mi ne malbone memoras, marde kaj ĵaŭde).

Mi ne povas memori nun, ĉu ni estis ses aŭ sep ĝelernantoj en la klaso. Kiu multe miregis al mi estis tute blindula homo, kiu pere de malgranda maŝineteto tajpis laŭ la Braille-alfabeto la lecionojn de Esperanto kaj la brilajn klarigojn, ke nia instruisto, s-ro Aldana, ofte donis al ni por nin helpi lerni kiel eble plej bone la lingvon. Ofte la blindulo, kies nomon mi ne memoras nune, petis halton por povi bone printi pere de tiuj strangaj kombinoj de reliefaj punktoj, la klarigojn, kiujn s-ro Aldana donis al ni. La instruisto (kiu ŝajne estis ankaŭ bona profesoro pri la angla lingvo) ĉiam haltis kaj

ripetis, laŭ bezone, la klarigojn, sed ĉiam li faris ankaŭ rapidigi la blindulon, kiu tamen sekvis senprobleme la lernadon ĝis la fino de la kurso.

Alia lernantino, kiu havis nur malmultajn jarojn pli ol mi estis virino, kiu ofte ĉeestis en la kurso kune kun sia fianĉo. Ili estis tre simpatiaj homoj. Estis ankaŭ du aŭ tri lernantoj pli, pri kiuj mi neniam memoras. Tiu lernantino partoprenis en nia lasta Zamenhofa bankedo kaj mi povis saluti ŝin post preskaŭ kvindekaj jaroj. Ŝi sidis maldekstre de Eduardo kaj dekstre de Antonia. Bedaŭrinde ŝi devis foriri tuj, kaj tial ni povis malmulte paroli. Mi esperas, ke ŝi venos en nian societon por rememori iomete la pasintan tempon.

En aprilo de 1968 Massiel gajnis la televida kanzon-konkurso "Eurovision", pere de ŝia kanzono "la, la, la". Antaŭ ol fini la kurson la ĝelernantoj petis al s-ro Aldana, ke li traduku al ni la tekston de tiu kanzono al Esperanto, kaj li tuj faris tion. Mi memoras, ke la gekursanoj de s-ro Aldana, ĉiuj kune, pli malpli bone sed entuziasme, kantis tiun belan kanzonon en Esperanto. Al ni tio multe plaĉis kaj la etoso estis vere bonega. Laŭ mi s-ro Aldana estis la plej bona instruisto de Esperanto en Frateco. Eble estis aliaj homoj, kiuj pli bone regis la lingvon, sed klarigi dubojn kaj interesigi la ĉeestantaron, li sciis fari pli bone ol iu ajn, kiun mi konis poste.

Antaŭ la fino de januaro de 1968 mi jam ricevis iom pli ol dudeko da instruhoroj, kaj mi min sentis kun kapablo por ekkomenci korespondi kun alilandanoj. Inés Gastón donis al mi adreson de rusa junulo, kiu deziris interŝanĝi bildkartojn, kaj mi ekkomencis fari tion. Sendube mi faris multajn erarojn, sed ĉar en bildkarto ne eblas enmeti multe da vortoj, la tasko ne estis komplika kaj vere ne estis multaj eraroj. La ĉefa afero estis, ke mi mem povis senhelpe skribi bildkartojn, kaj ke mi povas kompreni, kion la alia skribis al mi senprobleme. La tempo inter la sendo de bildkarto, kaj la ricevo de bildkarta respondo estis longdaŭra, ĉiam pli ol tri semajnoj kun Rusio, kaj tial mi petis aliajn adresojn al Inés, ĉar mi ĉiam senpacience atendis la ricevon de nova bildkarto.

Nun mi ne havas ĉiujn bildkartojn, kiujn mi ricevis, ĉefe dum 1968 kaj 1969, ĉar kelkajn mi ade disdonis al amikoj, kiuj ŝatis bildkartojn kun la celo, ke ili ankaŭ lernu nian internacian lingvon, sed post kelke da komenca intereso, neniam mi sukcesis

konvinki amikon, por ke li lernu Esperanton. Tri el ili ŝajne ekinteresiĝis, sed fine ili ne iris al Frateco por lerni la lingvon. De la jaro 1970 kaj poste eble mi havas preskaŭ ĉiujn malnovajn bildkartojn (ofte difektitaj), ĉar mi fine komprenis, ke mi ade perdis pli kaj pli da ili sen atingi mian celon, kiu estis konvinki kelkajn amikojn, por ke ili lernu Esperanton.

Ankoraŭ mi havas la unuan bildkarton, kiun mi ricevis en 1968 el Stanislav Koncebovski, kiu loĝis en Taŝkento, la ĉefurbo de la nuna Ŭzbekistano. Tiu rusa junulo ŝajne estis treege sportema kaj ni interŝanĝis bildkartojn dum iom pli ol jaro kaj duono, ĉar niaj interesoj estis tre malsamaj. Fakte, se tio okazis, ne estis tre longdaŭra la korespondado, kiu dum la unuaj jaroj temis ĉiam pri interŝanĝo de bildkartoj kun malmulte da skribita teksto. Vere dum miaj unuaj jaroj lernante Esperanton mi multe korespondadis kun alilandanoj, sed malmulte mi progresis, ĉar nur pere de interŝanĝo de bildkartoj mi ne

bezonis akiri grandan kvanton da vortoj por respondi bildkarte al miaj gekorespondantoj. Kiam mi ade kaj pli serioze, nur kelkajn jarojn poste mi komencis skribi leterojn, tiam mi ekriĉigis mian vortprovizon, ĉar mi devis ofte uzi la vortaron samtempe por kontroli, ĉu mi skribis korekte vortojn, kiujn mi kutime ne uzis dum mia unua interŝanĝado de bildkartoj kaj por scii kiel esprimi en Esperanto kelkajn frazojn, kiujn mi antaŭe neniam uzis en mallongaj mesaĝoj.

En tiu tempo mi neniam parolis esperante, krom por respondi demandojn en la kurso. Estas vere, ke mia aŭda kompreno de la lingvo ne estis malbona, ĉar fine de mia unua kurso alvenis polino al nia klubo kaj por mi estis vera surprizo, kiam mi mem konstatis, ke preskaŭ ĉion mi komprenis senprobleme, sed malgraŭ tio, mia esprima kapablo estis treege malalta, ĉar fakte mi neniam uzis parole la lingvon, krom por respondi al rektaj demandoj pri temo jam pli malpli bone lernita en antaŭa leciono.

Elementos estructurales del Esperanto

Bov⁰ Raíz o lexema																	
			O ¹ Sustantivo			A ² Adjetivo			J ³ Plural			I ⁴ Infinitivo					
Bo ⁵ Parentesco por matrimonio	Dis ⁶ Dispersión, separación	Ek ⁷ Acción que empieza	Ul ⁸ Individuo carac- terizado por	In ⁹ Sexo femenino	Aĵ ¹⁰ Cosa concreta	Ej ¹¹ Lugar adecuado para	Ec ¹² Cualidad abstracta	Em ¹³ Inclinación, hábito	Ig ¹⁴ Hacer, volver	On ¹⁵ Forma números fraccionarios	Et ¹⁶ Diminutivo	As ¹⁷ Presente			N ¹⁸ Acusativo		
Eks ¹⁹ Cese de función o estado social	Mal ²⁰ Lo contrario	Re ²¹ Repetición, devolución	An ²² Miembro de una colectividad	Id ²³ Descendencia directa	Il ²⁴ Instrumento	Ing ²⁵ Objeto en que se inserta	Ism ²⁶ La doctrina, el sistema	Ebl ²⁷ Posibilidad pasiva	Iĝ ²⁸ Hacerse, volverse	Obl ²⁹ Forma los multiplicativos	Eg ³⁰ Aumentativo	Ĉj ³¹ Diminutivo cari- ñoso hombre	Is ³² Pasado				
Ge ³³ Reunión de los dos sexos	Mis ³⁴ Erróneo, equivocado		Ist ³⁵ Profesión o adepto	Estr ³⁶ Jefe de	Ar ³⁷ Conjunto de	Uj ³⁸ Que contiene		Ind ³⁹ Digno de	Ad ⁴⁰ Acción duradera o repetida	Op ⁴¹ Forma los colectivos	Aĉ ⁴² Aumentativo	Nj ⁴³ Diminutivo cari- ñoso mujer	Os ⁴⁴ Futuro				
Pra ⁴⁵ Pariente lejano, antepasado		Fi ⁴⁶ Peyorativo moral			Er ⁴⁷ Partícula de un todo			End ⁴⁸ Obligación pasiva			Um ⁴⁹ Indeterminado		Us ⁵⁰ Condicional				
												U ⁵¹ Imperativo	E ⁵² Adverbio				
												Ant ⁵³ Participio activo presente	Int ⁵⁴ Participio activo pasado	Ont ⁵⁵ Participio activo futuro			
												At ⁵⁶ Participio pasivo presente	It ⁵⁷ Participio pasivo pasado	Ot ⁵⁸ Participio pasivo futuro			

Prefijos

Sufijos nominales

Sufijos adjetivos

Sufijos numerales

Sufijos universales

Otros sufijos

Partículas indicativas

Terminaciones

Acusativo

Libroj de Frateco grupiĝas en du grandaj librejoj. Unu ligna, kiu troviĝas apud la granda tablo, kaj unu pli granda, kiu troviĝas laŭlonge de muro. Ĉi tiu ricevas la nomon "biblioteko doktoro Olavide", omaĝe al la esperantisto, kiu donacis ĝin al Frateco post sia morto. Ĝi enhavas pli ol 1100 librojn kaj dokumentojn. Rigardante tiun grandegan kvanton de libroj pri plej diversaj temoj oni sentas emon ekcii iom pli pri tiu, sendube interesa, persono. Tiucele mi petis al nia samiedano Miguel Ángel Martín, kiu konis lin persone, ke li skribu etan portreton pri li. Jen lia rakonto:

"Mi ekkonis la doktoron Jose Eugenio Olavide Garcia-Inés je la 80aj jaroj. Li naskiĝis en la jaro 1916 kaj mortis en 1992. Profesie li estis neŭrologo-psikiatro kaj amatore intereseĝis pri ŝako, kolektado de libroj kaj literaturo. Li vizitadis la ŝak-klubon Club Ajedrez Fuenclara. En la sama grandega salono kunvivis pluraj asocioj krom la ŝakklubo, kiel ekzemple Cofradia de la Coronación de Espinas. Tie ekzistis ankaŭ trinkejo. Du amikoj kaj mi frekventis la salanon, ludis ŝakon, kartludis kaj entute pasigis la tempon agrable kaj en bona etoso.

Iam, doktoro Olavide demandis al mi kaj al alia membro de la ŝakklubo: Ĉu vi dezirus lerni novan idiomon? Tuj ni pensis, ke temis pri la angla, sed ne, li invitis al ni malĉovri esperanton. Provizore ni akceptis. Ĉe la sama salon, po unu tago semajne, li instruís al ni la rudimentojn de esperanto. Post nelonge li alportis ĉinan rakonton de la tiutempa revuo "El popola Cinio". Kelkajn monatojn poste doktoro Olavide proponis al mi viziti Fratecon.

Doktoro Olavide gvidis plurajn elementajn kursojn en Frateco, en la antaŭa sidejo de Frateco ĉe strato San Vicente Paŭl. Li ne emis partopreni en esperantaj movadoj nek aparteni al iu ajn estraro. Fizike, li estis mezalta homo kun longa kaj densa barbo. Pri lia karaktero malmulte mi povas diri, ĉar mi ne konis lin sufiĉe. Dum nia komuna ĉeesto en la ŝakklubo kaj post la instruado de la lingvo, ni intersalutis kaj ne multe pli. Mi konstatis ke li estis respektama homo kun ĉies ideoj. Politike, mi opinias lin

liberala. Mi ne scias ĉu li legis ĉiujn librojn el la biblioteko, sed mi vetus, ke jes.


Fine, jen eta anekdoto pri lia instruado. Por traduki hispane la pronomon "kio", li ridete diris, ke ni rememoru la hispanan esprimon "¿Qué coño!". Mi neniam forgesis tion."

Mi ŝatus aldoni plurajn penik-tuŝojn al ĉi tiuj rememoroj de Miguel Ángel. Mi ne konis doktoron Olavide persone, ĉar li jam forpasis kiam mi komencis frekventi Fratecon, sed mi povus diveni kelkajn trajtojn de lia karaktero. Mi vetus, ke li estis scivolema, detalesma kaj diciplina homo. Mi kredas lin scivolema pro la vario de liaj interesoj (psikiatrio, literaturo, esperanto, ŝakoj) kaj pro tio, ke lia biblioteko enhavas plej diversajn temojn. Mi dirus lin detalesma, ĉar en pluraj libroj liaj, kiujn mi legis, mi rimarkis notojn, komentojn kaj korektojn de

li manskribitajn. Finfine mi juĝus lin diciplina kaj metoda ĉar en lia biblioteko estas pluraj kajeroj, kie li kopiis mane tutajn librojn kvazaŭ mezepoka kopiisto, de la unua ĝis la lasta paĝo. Eble li faris tion, ĉar li ne povis aĉeti la originalon kaj devis do kontentigi per kopio.

Cetere, serĉante pli

da informoj pri doktoro Olavide en interreto, mi trafis kuraciston de la deknaŭa jarcento kun lia sama familia nomo. Temas pri José Eugenio de Olavide y Landazábal (1836-1901), naskiĝinta kaj forpasinta en Madrido, kiu estis konata dermatologo kaj sciencisto en sia epoko. Interalie li fondis primedicinan muzeon, kiu portas sian nomon kaj kiu troviĝas en la hospitalo San Juan de Dios de tiu sama urbo. Mi tuj supozis, ke povis temi pri praulo de nia doktoro Olavide, do mi provis trovi la rilaton inter ili ambaŭ. Dank' al la genealogia datumbazo myheritage.com mi eksciis, ke la dermatologo Olavide havis filon, kiu nomiĝis Francisco Olavide Malo, kiu estis madrida advokato kaj juĝisto, kiu siavice naskis la esperantiston kaj psikiatron doktoro Olavide en la jaro 1916. El ĉi tio oni povas diri do, ke nia doktoro Olavide devenis el burĝa kaj klera familio kaj ke li heredis la medicinan profesion de lia avo.



En aŭtuno de la jaro 1979 la plugilo de iu terkulturisto stumblis kontraŭ kelkaj etaj kaheloj koloraj enterigitaj, kiuj figuris homojn. La loko de la eltrovo nomiĝas «La Malena» kaj distas du kilometrojn de la vilaĝo Azuara, kampara vilaĝeto de la regiono de Belchite, kiu troviĝas je 60 kilometroj de la urbo Zaragozo.

Kiam la aŭtoritatoj de la aragona registaro ricevis la sciigon de tiu arkeologia eltrovo, ili sendis skipon de spertuloj, por ke ili donu sian opinion pri la areo malkovrita. Laŭ ilia prijuĝo temis pri vilao tre valora el la unua jarcento post Kristo. Post ol mezuri ĝian perimetron, oni komencis fosi ĝin kaj pristudi la unuajn strukturojn arkitekturajn kaj objektojn eltrovitajn. Tiu laboro komenciĝis en la jaro 1986, sub la protektado kaj financado de la Departemento pri Edukado kaj Turismo de la Registaro de Aragono, kaj finiĝis en la jaro 1999 post la fosado de 200 m².

La antikvaj restaĵoj de «La Malena» estas tre variaj: oni identigis 40 dependaĵojn, kies plankoj estis konstruitraj laŭ uzadoj kaj laŭ rangoj de ties loĝantoj. La pli noblaj cambroj havis belajn plankojn laŭ la gusto de la posedantoj. Ekzemple, aperis mozaiko, kiu figuras la nupton de Kadmo kaj Harmonio benitan de la dioj de Olimpo. Ankaŭ aperis granda kvadrata korto, proksimume 50 metrojn larĝa, fronte al la ĉefa hejmo, kaj baseno dekorita per mozaiko de maristaj temoj. Ĉi tiu korto rekte komuniĝis kun la dependaĵoj plej gravaj de la ĉefa hejmo per koridoroj kun arkoj, kiujn subtenis marmoraj kolonoj kaj skulptaĵoj, kiuj statis

sufiĉe damaĝitaj. La du skulptaĵoj plej bone konservitaj estis virina kapo, kiu laŭ la fakuloj reprezentas Atenea-Orka, kaj ebria faŭno. Ili ambaŭ estas rigardeblaj en la muzeo de Zaragozo.

Inter la multaj fragmentoj eltrovitaj, estas vazaroj (kaj por manĝi kaj por konservi nutraĵojn), metalaj objektoj, oraj ringoj, glasoj kaj boteloj vitraj, ktp. De iuj rubejoj oni eltiris ostojn de ŝafinoj, de ĉevaloj, de porkoj, de aproj kaj ankaŭ abundaj konkojn de ostroj kaj de riveraj moluskoj. Ili havigis abundan informon pri la ekonomiaj kutimoj kaj pri la komercaj rilatoj de la loĝantoj de tiu vilao, kiu eble estis loĝita ĝis la kvina jarcento de nia erao. Krome oni eksciis, ke en ĝia konstruado kaj situigado observiĝis la reguloj de la arkitekto Vitrubio, tiel kiel estis priskribitaj de Varron kaj Columela, ambaŭ de la unua jarcento antaŭ Kristo: la vilaoj devis konstruiĝi malproksime de urboj, oni devis starigi ilin en salubra loko, ili devis havi abundan akvon (ĉi-kaze la rivero Cámaras fluas je proksimume de 100 metroj), oni devis povi fari kanalojn por irigacii la legomĝardenojn kaj laste, oni devis dividi la areon en tri partojn, unu loĝeblan, unu kamparan kaj unu kun fruktarboj. Ĉiujn kondiĉojn ĉi plenumis «La Malena».

Fine, endas diri, ke la fakuloj pri arkeologio ne akordiĝas pri tio, ĉu tiu vilao estis konstruita por gastigi religian komunumon, kiu praktikis paganajn kultojn laŭ la maniero de monaĥoj de Samotraco, aŭ estis bieno dezajnita de iu riĉa proprietulo de la regiono.



FRATECO

Ĉiu mardo en nia sidejo
kursoj por komencantoj
kaj progresantoj.

Esperanto-Asocio en Aragono

Asociación Aragonesa
de Esperanto

Calle Cadena, 20, 1^o izda. 50001-Zaragoza

fratecoesperanto@yahoo.es

La dua ĵaŭdo monate,
renkontiĝo en Bull McCabe's
Irish Pub, C/ Cádiz, 7.

Dum la fruaj 1920-aj jaroj Einstein vojaĝadis tra la mondo prezentante sian –tiam novan– Teorion de la Relativeco al la scienca komunumo. Eble ne multaj homoj scias, ke li vizitis Zaragozo kadre de tiu mondvojaĝo. En 1923, Madrido, Barcelono kaj Zaragozo estis la nuraj hispanaj urboj kie Einstein prelegis, kvankam li ankaŭ ricevis invitojn de Bilbao kaj Valencio, kiujn li rifuzis.

La invito

La invito al la tiama plej moda scientisto estis iniciato de la Universitato de Zaragozo. Jerónimo Vecino, Profesoro pri Fiziko en la Fakultato pri Scienco, kaj Antonio de Gregorio y Rocasolano, Profesoro pri Hemio en la sama Fakultato, skribis al Einstein, profitante, ke li vizitus Madridon kaj Barcelonon. Li akceptis la inviton doni du prelegojn en la Universitato.

La vizito kaj naskiĝtago en Zaragozo

Tiel, Einstein pasigis 50 horojn en Zaragozo, de la 12-a ĝis la 14-a de marto de 1923. Ĉi tiun tagon, kiam li forlasis la urbon, estis lia 44-a naskiĝ-datreveno.

Einstein estis bonvenata de gravuloj en la urbo, tio estas, la urbestro, Basilio Fernández, la Civila Estro kaj la Germana Konsulo, krom la invitintoj Vecino kaj Rocasolano, la rektoro, Ricardo Royo Villanova, kaj kelkaj reprezentantoj de la germanoj loĝantaj en Zaragozo.

Krom la scienca parto de la vizito, Einstein estis regalata per ĉeesto al teatraĵo, bankedoj kaj folklora muziko.

La prelegoj

Einstein prelegis dufoje en la Ĉefa Klasĉambro de la Fakultato pri Medicino kaj Scienco (nuna Paraninfo). Nuntempe aŝiŝo ĉe la enirejo al tiu klasĉambro memorigas nin pri la eminenta vizito.

La unua prelego, la 12-an de marto, temis pri la Teorio de la Relativeco kaj estis prononcata en la franca. La klasĉambro estis plenplena, eĉ kvankam multaj el la ĉeestantoj ne povus kompreni la prelegon, kaj pro la malfacileco de la konceptoj kaj pro lingvaj kialoj.

La dua prelego, la 13-an de marto,


estis malpli vizitata sed pli ol sufiĉe sukcesa. Ĝi temis pri la strukturo de la spaco kaj ĉi-foje li parolis en la germana.

La perdita skribtabulo

Por ambaŭ prelegoj, Einstein postulis disponi je skribtabulo, per kiu li povus apogi siajn klarigojn, ĉar li tute ne scipovis la hispanan. Tiel li povus skribi la konvenajn matematikajn formulojn, kompreneblaj de la sciencistoj, eĉ se ili ne scipovus la francan aŭ la germanan.

Je la fino de la dua prelego, la rektoro, Ricardo Royo Villanova, petis al Einstein, ke li ne forviŝu la skribtabulon, kaj ke li subskribu sur ĝin. Laŭ la vortoj de Royo Villanova: “Por ke restu ion ĉiaman kaj konstantan de la paso de Einstein tra la Universitato, mi petegis al la saĝa profesoro, ke li ne forviŝu kaj ke li valorigu per sia subskribo la desegnojn faritajn sur la skribtabuloj dum sia prelego. Ĉi tiuj estos taŭge fiksataj kaj konservataj kun la celo povi montri ilin al la venontaj generacioj, kiel postrestaĵoj de la hodiaŭa dato”.

Tamen, la hodiaŭa loko de tiu skribtabulo estas nekonata. Eble ĝi ankoraŭ restas en iu subtera etaĝo, aŭ ĝi ne postvivis la enlandan militon aŭ la translokiĝon de la fakultato, aŭ eble ĝi estis akcidente forviŝita de iu neinformita pedelo. Kelkaj nunaj universitataj profesoroj opinias, ke la rektoro konservis la skribtabulon tiel diligente, ke neniŭ pli povis trovi ĝin post lia morto, sed ĝi ja devas esti ie kaj iam aperos. Eĉ oni povus fipensi pri la eblo, ke iu profitis





la translokiĝon de la fakultato kaj la modifon de la konstruaĵo por ŝteli ĝin kaj ekhavi monprofiton en la estonteco.

Mencioj al la malfaciloj de Germanio kaj studenta kvesto

Tiuj jaroj post la Unua Mondmilito estis ja malfacilaj por Germanio kaj la fakto estis kompreneble menciata dum la vizito. Dum bankedo en Casino Mercantil, Einstein mem esprimis sian maltrankvilon pri la Respubliko de Weimar kaj pri la ekonomia kaj socia krizo en sia lando.

Ankaŭ tiuj malfaciloj decidigis grupon de studentoj kolekti kveston por la germanaj reserĉistoj. La monsumo estas nekonata, kaj ĝi estis rekte enmane donata al Einstein en koverto kun letero en la germana: "[...] [La studentoj] ankaŭ decidis kolekti kveston por la germanaj universitatoj, cele apogi la germanajn kolegojn, kiuj troviĝas en situacio de neceso en la nunaj malĝojaj

Memoriga foto de la vizito de Einstein.

cirkonstancoj, kaj helpi ilin superi la misfortunojn, kiuj afliktas vian landon".

Ci tiun leteron oni konservas nun en la arkivejo de la Hebrea Universitato de Jerusalemo, kune kun la diplomo de la Akademio de Sciencoj Matematikaj, Fizikaj, Ĥemiaj kaj Naturaj de Zaragozo, donita al Einstein dum la sama vizito.

Vizito sen gravaj postsekvoj

Male al supozeble, la vizito de Einstein ne lasis profundajn spurojn sur la hispana scienca vivo, laŭ la tiuepoka gazetaro kaj la nunaj historiistoj. Nek la hispana scienca reserĉo iĝis pli eŭropeca, nek oni eklaboris multe pri la nova Teorio de la Relativeco de Einstein. Sajnas, ke lia ĉeesto en Zaragozo kaj Hispanio estis pli grava por la socia kroniko ol por la sciencaj postsekvoj. Eĉ tiel, ĝi restas kiel interesa parteto de la historio de nia urbo.

La strato de "La Cadena" de Zaragozo, kie situas nun la sidejo de Frateco kaj "Fundación Esperanto", estis antaŭ pluraj jarcentoj paradiza loko plena da verdo, floroj kaj arbaroj, tute apude al la rivero Huerva, kiun la reĝo Johano la 1^a de Aragono elektis por starigi sian vilaon. Tie li amis loĝi kiel eble plej longe.

Diras antikvaj legendoj, ke lia vilao, la mirinda kampodomo nomata "Artal de Foces" posedis luksajn salonojn, estis ĉirkaŭata de altaj muroj kaj havis ĉe la ĉefpordo ferĉenon, kio tiuepoke signifis ke en la domo aŭ palaco loĝas reĝo.

Johano la 1^a, reĝo de Aragono (1350-1396), ŝatis astrologion, ĉasadon kaj muzikon, kaj li protektis la poezion kaj beletron, sed speciale li helpis la medicinon. Dank' al tio li sukcesis mildigi epidemion, kiu terure disvastigis tiuepoke en aliaj regionoj. Li ne estis lerta reganto, ĉar li ne bone sciis administri siajn teritoriojn, sed li strebis ĉiam por la Paco. Ja la problemoj, kiuj prezentiĝis al li, ne estis facilaj: li heredis la komplikajn problemojn de la ekspansia politiko de la Aragona Krono ĉe Mediteraneo.

Tiutempe Aragono perdis plurajn gravajn teritoriojn, inter ili la belan Ateno. Li eĉ pretendis starigi, en propraj teritorioj, la Papon de Avinjono, la aragonanon Benedikto la 13an.

Senlaca bibliofilo, Johano la 1^a, efike helpis la progreson kaj kulturon dum sia naŭjara regado. Lia kortego estis humanisma fokuso, kie ĉiam trovis protekton la trobadoroj, muzikistoj kaj sciencistoj. Elmonro de tiu politiko kaj agado estis la sukcesa restarigo de la Floraj Ludoj en 1393.

Kiam forpasis la reĝo kaj malaperis la belega kampodomo "Artal de Foces", okupis la lokon dometoj, kiuj baldaŭ formis unu el la Zaragozaj kvartaloj. Tamen la popolo neniam forgesis la ferĉenon de la reĝa vilao kaj daŭre nomas la lokon "de la Cadena" (de la ferĉeno), kie nun situas la domo de la zaragozaj geesperantistoj.

Sur tiu loko parfumita de kultura etoso, nun ĉe la urbocentro, aĉetis sian domon la centro Frateco kaj "Fundación Esperanto". Volu la dioj, ke Esperanto trovu en tiu iama paradizejo de la Kulturo, apud rivero Huerva, la inspiron, kiun ni de longe sopiras kaj nepre bezonas, ne nur nun, sed por eterne!!!

La nuna Esperanto-domo

Estis tiuj tre, tre doloraj tagoj kiam la zaragozaj esperantistoj restis sen hejmo kaj sen mono suferantaj tian grandan malfeliĉon ke ni devis peti al la potencaj dioj al la homoj kaj eĉ al la fejnjoj multe da mono, kelkajn milionojn por aĉeti belan reĝo-domon....

Kiel tre povra almoz-petanto mi iris de unu hom' al la alia, eĉ al la fejnjoj, kaj ĉiopovaj dioj kiuj nur sciis respondi "nenion", kaj per tiu negativa vorto la problemo ne trovis solvon...

Fine, la miraklo estis du esperantistoj, esperantistoj ĝis la medolo, modestaj, malriĉaj, solidaraj, kiuj komprenis la problemon kaj promesis donaci eĉ milionojn por aĉeti konfortan reĝodomon!!

Venis la mono, ni trovis domon, mi studis l' antikvan historion kaj sendube kun granda ĝojo mi sciis ke en la strato ferĉeno, la nuna kiun ni jam nun loĝas, estis vilao de l' Aragona reĝo, loko plena de verdoj kaj floroj apud de rivero nomata Huerva kiun ornamis centoj da arboj kaj la scio plenigis mian koron de granda ĝojo!!!!

Ni neniam forgesos al tiuj donacintoj!!
Ni neniam forgesos la historion de la ferĉeno, nun, de la esperantistoj!!



FRATECO



En 1141 Pedro de Atarés donaciis la valojn Veruela kaj Maderuela al monaĥoj de Scala Dei por fondo de monaĥejo laŭ titolo de la Virgolino Maria. Tamen la ordeno Cister ne permesis la fondon ĝis 1145.

La monaĥoj cistercianoj ĝuis la abundon de ŝtonoj kaj akvo por la konstruo kaj funkciado de la monaĥejo krom posedo de apudaj loĝlokoj, farmoj ktp., kio faris de la monaĥejo institucio senjora de la areo. Veruela estis abandonita de cistercianoj en 1835, okaze de la desamortización de Mendizábal, kio okazigis la detruon kaj abandonon de la monaĥejo. Tamen asocio de lokanoj de Borja kaj Tarazona malhelpis la totalan ruinon kaj kreis gastejon por konservi la monumenton. Ties gastis ekzemple dum la dua duono de la 19-a jarcento riĉaj zaragozanoj kaj gavuloj kiaj la fratoj Bécquer, nome la poeto Gustavo Adolfo kaj Valeriano Domínguez Bécquer, la pentristo; ambaŭ trovis tien romantikan lokon kiu inspiris multajn partojn de ties verkoj, ĉefe la kolekto de leteroj de Gustavo Adolfo publikitaj laŭ la titolo de Desde mi celda (ekde mia ĉelo), kaj parto de la kolekto de gravuraĵoj de Valeriano. Tio famigis la monaĥejon de Veruela pli ol la longa estado de cistercianoj el 1145 al 1835, aŭ la estado de jezuitoj el 1877 al 1975.

En 1976 la ŝtato pruntedonis la monaĥejon al la Provinco Zaragozo por ties rehabilitado kaj konservado. Ekde 1998 Veruela estas malfermita al la publiko kaj tie okazas kultura agado, kia ekspozicioj, kursoj aŭ muzikaj festivaloj.

